



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Simpla : 5 fkoj }
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO
1964

6

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Novembro - Décembre

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna presaĵo.

ENHAVO

El la kulturodomo :

Novenkondukaĵoj.

Esperanto tra la mondo.

El ie en la mondo :

La vivo en Laponio (I) K. Väättänen.

Internaciaj kaj Turismaj Ferioj.

Apud Grésillon :

Le Lude.

Anekdojot pri Otto Herman

P. Balkanyi.

El Anĵuo :

Blanka vino (B. Chevery).

Antaŭ 150 jaroj :

Mihail Lermontov (A. Logvin).

Fantaziaĵoj (H. Chavan).

Por via distro :

Nia konkurso.

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spingulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.



Kulturaj Kajeroj

*tintigas la glasojn kun ĉiuj siaj
legantoj, je ilia sano okaze de
la nova jaro.*

NOVENKONDUKAĴOJ

La amikoj, kiujn jam informiĝis pri la 1965-aj aktivadoj en la Kulturdomo povis konstati, ke la administrantaro enkondukis tri novajn erojn. La unua estas, ke la vojaĝantoj al Grésillon okaze de la Internaciaj-Ferioj povos halti en Parizo kaj ĝin viziti gviditaj de samideanoj (23-25 julio). El la programo de la vizitoj ni eliras la jenajn punktoj : vizito de la ĉefaj monumentoj (Eifel Turo, Triumfarko, katedralo Notre-Dame, Unesco Palaco, Louvres, ktp...), de la Latina Kvartalo, de la Moskeo, de Montmartre, kun nokta promonado sur la rivero Sejno. Bela okazo por la gesamideanoj, kiuj ankoraŭ neniam vizitis Parizon aŭ deziras ĝin reviziti, kaj ankaŭ certe tre agrebla kunestado ĉar la vizitoj okazos verŝajne per privataj aŭtomobiloj de parizaj esperantistoj. La partoprenantoj loĝos en komforta hotelo kaj kune vojaĝos de Parizo al Grésillon.

Dua nova enkondukaĵo, la sistemo de « suma pago » por la Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj-Ferioj (25 julio-8 aŭgusto). Per tiu sistemo la partoprenantoj, kiuj intencas ĉeesti la tutan periodon povos profiti rabaton pri la ekskursoelspezoj. En la listo de tiuj ekskursoj aldoniĝis vizito de Le Mans. Tiu urbo estas mond-konata ĉar tie okazas ĉiujare en Junio la « 24-hora aŭto-

kurado ». La ekskursantoj povos viziti la kurejon. Ankaŭ la urbaj monumentoj estas vizitindaĵoj kaj ĉefe la malnova urbo. Alia alloga loko estas la « Muzeo de la Aŭtomobilo », kie estis kolektitaj aŭtomobiloj la plej modernaj kaj la plej malnovaj. Ankaŭ, se eble, estos vizitata la aŭtofabriko « Renault », kie ekzistas esperanto-grupo.

Trie, dum la Kulturaj Semajnoj (8-29 de aŭgusto), krom la kutimaj Esperanto-kursoj kaj instruoj de bindado kaj de korbofarado, la interesatoj povos ricevi ĉiujare iniciadon al kino arto. Pri kio temas ? Ĉiun posttagmezon, en speciale aranĝita salono, okazos diskutoj aŭ prezentadoj de filmoj, kaj kompetenta amiko, S-ro Thébaud, komentos la filmojn pri la roluloj, la temo, la tekniko, kaj montras kiamaniere bone juĝi filmon. Kaj certe post tiu studado la ĉeestintoj estos kapablaj plene ĝui la verkojn de filmistoj.

Jam multaj informpetoj venis al la administrantaro. Sendube la novaj aranĝoj altiros ankoraŭ pli da gesamideanoj. Por ke la vizito de Parizo estu plensukcesa necesas ke la specialaj aliĝoj atingu nin antaŭ la 15-a de Aprilo. Do informpetu kaj aligu frue, ĉar, tro ofte, ni bedaŭras, ke ni devas rifuzi la malfruantojn.

Esperanto tra la Mondo



Jaro de la Internacia Kunlaboro

Unuigitaj Nacioj decidis ke 1965 estos jaro de internacia kunlaboro. Apogante tiun kampanjon U.E.A. decidis ankaŭ laŭnci peticion por peti UN subteni la disvastigon de Esperanto Subskribu kaj subskribigu la peticiajn foliojn? Kolektiva subskribo de ĉiusepacaj organizoj estos ankaŭ bonvenaj.

Kien vi iros proksiman jaron?

— Fervoja Esperanto-Kongreso, en Hamar (Norvegujo), 22-28 de Majo.

— Nordlanda Kongreso, en Oslo (Norvegujo), 19-22 de junio. Adreso: Postboks 942, Oslo.

— Eŭropa Esperanto-Konferenco en Vieno (Aŭstrujo), 11-17 de Julio. Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV.

— Semajno de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo en julio, ĉe lago Balaton (Hungario). Anna Salamon, Budapeŝt II, Arpad fejedelem ut. 27, Hungario.

— 50-a Universala Kongreso en Tokio, 31-a de Julio - 7-an de Aŭgusto UEA, Nieuwe Binneweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

— Internacia Junulara Kongreso de TEJO, en OOTO, apud Kioto, 8-15 de Aŭgusto. Kansai Esperanto-Renmei, 3-10, Nakatu Hamadori Ooyodo-Ku, Osaka, Japanujo.

— Someraj restadoj en la Internacia Esperanto-Somerumejo, Primošten, Jugoslavio. Informoj ĉe tiu adreso.

— ... kaj konsultu la programon de nia Kulturdomo, Kastelo Gresillon.

El Japanujo

Jus aperis en Osaka, lukse prezentita « Enkiklopedieto Japana » en kiu la aŭtoro T. Nakamura, membro de la Akademio de Esperanto, kolektis, ilustris kaj definis ĉ. 400 terminojn asimilitajn el la japana lingvo en la Internacian Lingvon esperanto. La bela volumo eldonita ĝustatempe por la 50-a Universala Kongreso emfazas ĝis kiel alta grado la Internacia Lingvo estas influata tiel de orientaj kiel de okcidentaj verkistoj.

El Brazilo

Ekde la dua sesmonato de 1964 komenciĝis instruado de Esperanto en la Katolika Universitato de Porto Alegre laŭ decido de ĝia Fakultato de Filozofio. La lecionojn gvidas internacia grupo da instruistoj. Jam de majo 1964 funkcias 3 kursoj de Esperanto en la Universitato de Cearā, en Fortaleza, ĉe la norda marbordo de Brazilo. La Universitato de Goiás, en 1963, kiel unua uni-

versitato en Brazilo, enkondukis la Internacian Lingvon.

El Ĉinio

Komenciĝis oficiala kurso de Esperanto en la granda universitato de Pekino. Jam en minimume 6 universitatoj kaj 2 fremdlingvaj institutoj de Ĉinio la studentoj havas la eblecon studi la Internacian Lingvon. Krome sesio de kursoj okazis por studentoj de la ŝtata Seminario por instruistoj en Pekino.

El Francio

Fine de Oktobro la esperanto-rondo « UNESKO-klubo » de Angers prezentis ekspozicion pri orientaj artaĵoj, kiu entenis kvar fakojn: antikvaj mozaikoj de Israelo (cirkulanta ekspozicio de Unesko), miniaturoj, skulptaĵoj kaj freskoj de Hindujo (reproduktaĵoj ricevitaj de la oficialaj servoj en New-Delhi, dank-al Sino Haudebine), pentraĵoj kaj bildoj de Ĉinio (eltiritaj parte el la eldonaĵoj de Ĉina Esperanto Ligo), Esperantaj Libro el aŭ pri Oriento.

La organizantoj ricevis la patronadon de la franca federacio de la Unesko-kluboj kaj de la Franca Komisiono por Unesko.

Novaj interesaj libroj

(haveblaj ĉe nia libro-servo)

— « Frisaj rakontoj »; pecoj de la aparta literaturo de tiu nederlanda provinco.

— « Hamleto » de Shakespeare, en la traduko de Zamenhof, kun interesaj komentoj.

— « Biblia Revuo »; sciencnivela revuo (4 numeroj jare) pri bibliaj studoj kaj pri antikva historio de proksima Oriento.

— Ni memorigu al vi la revuojn « Kontakto » (por junularo) kaj « Monda Kulturo » (literatura).

— Edition française d'Esperanto ĵus eldonis ilustritan lernbroŝuron: « Nos premiers pas en esperanto »; vendotan kun akompana disketo por elparolo. La tuto Kostas nur 2,50 fr. Moderna propagandilo por franclingvanoj.

— Komencas aperi « Studento » organo de STELO (esperantistaj studentoj). Skribu al: Anna Salamon, Budapeŝt II, Arpad fejedelem ut. 27, Hungarujo.

Famekonatan francan brandon KONJAKO disvendas s-ano Despeyroux reprezentanto, 200, rue du Faub. St-Denis, Parizo (10). Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Ekspedo en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu!

El ie en la mondo

La vivo en Laponio de Finnlando

(I)

La iama laponia legendo rakontas : « ke ĉe kreado de la mondo oni kreis la Nordon plej laste. La kreinto estis tiam laca, kaj ne interesiĝis plu pri la laboro same kiel komence. Post la Nordo iel formiĝis, la kreinto dormetis. Vekiĝinte li trarigardis sian kreaĵon. Ĉion alian li vidis bona, sed ne estis kontenta je sia lasta kreaĵo, Nordo. Tre multe mankis da bona kompare al la aliaj partoj de la mondo. Pripensinte la situacion, li komencis ripari la Nordon. Ĉe sia riparlaboro li senŝpare uzis kolorojn, disjetante diversajn kolornuancojn al somera, hela ĉielo. Sed la plej efikan brilon li pentris en aŭtunan malhelon. En vintrajn, frostajn noktojn li preferis ekflamigi la « nordlumon » por briligii neĝo-krustajn prujnkristalojn. Kie troviĝis la plej griza dezerto, tie li plej klare montris sian kreadkapablecon kaj potencon. ».

Laponio de Finnlando estas vasta, enhavante



abundon en teritorioj, en kiuj la postsignoj de la Kreinto ankoraŭ estas videblaj sed ĝi enhavas ankaŭ multon, kiun la homoj faris kaj laŭ sia volo kaj avantaĝo daŭre faras. Tiel okazas interalie en la arbaraj partoj de Laponio.

Laponio konsistas el pluraj teritorioj. La ĉefajn el ili oni nomas : « Arbar-Laponio », — « Laponio de Inari », — kaj « Tundro-Laponio ». La plej vasta arbarteritorio troviĝas ĉirkaŭ la akvaroj de Kemi-Tornio kaj en la ĉirkaŭo de la riveroj de Muonio. Tiu regiono formas sian propran, klare el la ĉirkaŭo esceptan tutajon, kiu nun estas la ĉefa arbarteritorio de Laponio.

Se oni grimpas sur la plej altan pinton de « Sankta montaro » apud Pelkosenniemi kaj Kemijärvi, de sur tiu pinto estas videbla la arbarpejzaĝo de Laponio en sia plena vasteco kaj pompo, precipe ĉe klara, sennebulaj, aŭtuna vetero. Jen vidiĝas arbaroj kaj montetoj ĝis ekstervido, en forajo malaperiganta la bluan de la ĉielo. Dise briletas riveroj, lagoj kaj marĉoj en la malheleco de la arbarmaro.

La kolorriĉeco, kun siaj nuancoj, per kiuj

la Kreinto kompensis la malriĉecon de Nordo, regas ĉie. La solecaj montoj regas la ĉirkaŭon; kvazaŭ manifestante sian potencon. Malsimila estas la stato ĉe loĝejoj kaj vilaĝoj. Ili ŝajnas sin kaŝi en grandaj arbaroj, kvazaŭ timante miksi la kreaĵon de la Kreinto kaj la ekvilibron de koloroj. Nur la fumaĵoj de plej kuragaj enloĝantoj leviĝas al ĉielo elmontrante ke ankaŭ homoj loĝas tie ĉi. Precipe neloĝata estas la nordorienta teritorio, sed ankaŭ aliloke, ĉefe inter loĝdensejoj kaj vilaĝoj, situantaj apud ĉefpasejoj, troviĝas vastaj senloĝejoj, dezertoj. Marĉoj estas multaj. La plej vastaj marĉoj estas nur loĝejoj de grupoj kaj ansejoj, ankaŭ de cignoj de tempo al tempo. Oni rakontas, ke en la pratempo « la demonoj loĝis kaj petolegis en la nigraj profundejoj de la marĉoj, de tie okulumante kaj minacante al la devotiĝintoj. »

Estas kompreneble ke de sur la montoj de

« Arbar-Laponio » vidiĝas nur malmulte da fumoj, ĉar en la tuta teritorio troviĝas nur 13 loĝantoj po 2, 3 kvadrataj km. Laŭ statistiko de 1952 en la tuta teritorio, ekskluzive de la urboj Kemi kaj Tornio, estis nur 122 767 enloĝantoj. Laŭ la sama statistiko vivis en tuta Laponio 176 263 personoj. Tamen jam de nememoreblaj tempoj homoj migris al la dezertoj de Laponio, esploris regionojn, donis al ili nomojn kiuj konserviĝis kaj fine aperis sur la landkartoj. En la pratempoj la laponoj kultis idolojn kaj la ŝamanoj de Laponio estis famaj. Laŭ onidiro la lasta el ili estis Tuomas Lomajärvi kiu loĝis apud « Lomajärvi » (Ferio-lago) de Kittilä. De du jardekoj li nun ripozas en la tero. Kvankam superstiĉo kaj kultado de idoloj kolorigis la vivon de la laponoj ĝis malfruaj tempoj, ankaŭ la eklezioj pere de siaj severaj pastroj jam dum jarcentoj edukis kaj formis ilin.

La homo kreskinta en grandaj arbaroj estas silentema kaj meditema. Li estas naturamanto kaj observanto, kies okuloj trovas kaj solvas plej sekretajn signojn de la dezerto. Tie li sentas sin hejme kaj tie li meditas la fenomenojn de la vivo. Li havas sinceran honestan karakteron kaj volonte akceptas preterpasanton sub sian tegmenton. Sed en liaj okuloj ne gravas titolo aŭ banko-konto de gasto, nur karaktero kaj mensa stato kiujn li tuj rimarkas kaj pesas. Antaŭ homo li ne humiligas sed naturfortojn li estimas kaj ĉe ili konfesas sian malgrandecon.

Kiu vizitis la urbon Rovaniemi, ĉefurbon de Laponio, antaŭ la lasta mondmilito, tiu surpriziĝas nun. El la cindro de militruinaĵoj konstruiĝis la nova Rovaniemi, kiu ne multe similas la antaŭan. La lignaj dometoj estis anstataŭigitaj per brikdomegoj. La fama hotelo Pohjanhovi situas en sia originala loko ĉe la bordo de Ounaskoski (Ouna-rapidfluo). Spite tion ke la urbo ne havas industrion, la vivo tie intense pulsas. Sajnas kvazaŭ la ĉefurbo de Laponio ne bezonus fabrikon, nek lignajindustrion, kvankam ĝi situas tute apud la randoj de grandaj arbaroj. Promenante en la stratoj de nova Rovaniemi oni ne havas la impreson esti en Laponio. Fine de la lasta jarcento Rovaniemi estis nur ia foirejo, vilaĝo, kien la peltĉasistoj, la enloĝantoj de la ĉirkaŭo kaj la trunkflosistoj venis por komerci kaj sin distri. Precipe okaze de la vintro-foiroj, en la februaraj frostegoj la homoj ondis sur la stratoj. La bunteco de la peltajoj riĉigis la kolorriĉajn po-

pelkostumojn de la laponoj. Oni eĉ veturis per boacoj. Nuntempe la laponoj kaj la boacoj estas maloriĝaj vidindaĵoj en Rovaniemi. Ankaŭ la peltĉasistoj kaj la trunkflosistoj estas malaperintaj. Anstataŭ ili vidiĝas multaj aŭtoj kaj turistoj, alvojaĝantoj de ĉiuj anguloj de la mondo. Serĉante karakterizajn trajtojn de Laponio enaŭtiĝu kaj veturu provincon.

Veturado en nuntempa Laponio estas agrabla. Kvankam ne ĉiuj ŝoseoj en Finnlando estas renovigitaj, en Laponio ili estas bonaj. Oni povas veturi sur ili preskaŭ la tutan jaron. Se oni komencas rondveturadon en Laponio per aŭtobuso ekde la komercplaco de Rovaniemi, oni vidas tra la fenestroj, ke la ŝoseoj serpentumas laŭlonge de riveroj. Tiel estas ĉie en la nordo. Oni ofte transiras riveron per ponto aŭ pramo. Veturante per tiaj pramoj oni ankoraŭ kontaktiĝas kun tiu Laponio, kiu forkuras de subevolado. Salmo ne plu saltas en la bordojn spegulanta akvo-fluo, kiel antaŭe, sed la akvo-fluo trembrilas hela kaj larĝa trairente rokojn kaj arbarojn kaj memorigante pri « la lando de dekoj da akvo-fluoj ». Fiŝkaptisto per sia boato preterŝoviĝas.



Jen Laponio ! Laponion karakterizas ankaŭ heleso precipe dum la someraj noktoj. La domoj apud la ŝoseoj, ĉirkaŭataj de kampoj, briletas trans la brilo de akvoj kaj arbaroj. La flosistoj kaj la flasantaj trunko-ligaĵoj riĉigas la panoramon. Je ĉe la horizonto bluas la neĝkovritaj pintoj de altaj montoj. Boacaro aŭ soleca boaco povas aperi antaŭ aŭton kaj ĵetante siajn hufojn ekvagas laŭ sama vojo.

(daŭrigota).

S-ino Kerttu Vaatanen.

La internacia turista kaj kultura ferio en la kastelo Grésillon (2 ĝis 19 Julio 1964)

Tiu jam famkonata aranĝo havis denove grandan sukceson; kvankam la eksterlanda partoprenantaro ne estis tiel multnombra kiel pasintjare. Kiuj ankoraŭ ne travivis ĝin, ne povas imagi la agrablegan trankvilon kiu regas tie kaj la ripozon kiun oni ĝuas tie. La tuta grafolando Anjou estas tre bela kaj speciale la kasteloj kaj ĉirkaŭaĵoj estas ravaj. Sufiĉe riĉa biblioteko pruntas esperantolegajon al legemuloj. Estus tamen dezirinde ke niaj eldonistoj de tempo al tempo sendu donacon al la kulturdomo por rekompenci tiujn humilajn sed energioplajn laborantojn; ripensante samtempe ke tio estus propagando por ilia entrepreno. Ĉiutage estis konferenco. Dro Roose el Brugge donis la jenajn: 1) Kio estas arto?; 2) Evoluoj de la arto de la Renesanco ĝis la 20-a jarcento; 3) La arto de la 20-a jarcento (kun multaj diapozitivoj); 4) Historiaj originoj de nuntempaj problemoj en Belgio; 5) La historio en la instruado. Sino Roose: « Kiel resti juna ». La teksto de ĉi iasta aperis en « Kulturaj Kajeroj ». Sino Cheverry, en serio da prelegoj konigis la Anĵuan landon en la historio, ekonomio, turismo, ktp. Sino Roux donis du konferencojn pri la nomadoj en la Saharo. Dro Boulogne donis tre interesan paroladon pri labormedicino. Ĉiufoje la saman tagon okazis debato pri la konferenco. Provu pri la granda interesiĝo: oni devis ĉiufoje prilongigi la debatotempon. Fino Ingrid Roose ilustris la konferencan de la patrino per fizik-kulturaj movoj. Okazis ankaŭ la jenaj ekskursoj: 1) tuttaga al la kasteloj de la Loire. Tiukaze ni vizitis ankaŭ la abatejojn de Fontevrault kaj la preĝejojn de Cunault; 2) Duontaga al Angers, kun la ardezminejoj, la kastelegoj de Sankta Ludoviko, la antikva kvartalo kaj ankaŭ la pentrajmuzeo kiu estas tre riĉa je primitivuloj kaj 18-a jarcentaj pentraĵoj. La sinjoro konservatorio speciale bonvenigis nin kaj per-

mesis senpagan viziton; 3) La son — kaj lumludo en la kastelo de Le Lude, kiu daŭras 1,45 h. kaj kiu estas eksterordinare bela; 4) La zoologia ĝardeno de La Flèche. La regionaj ĵurnaloj publikigis artikolojn kaj fotojn. Ĉiun vesperon estis ankaŭ iu distraĵo. La Hamburganoj, ges. Wielguss, s-inoj Kogel kaj Gunther kaj sro Hans Schutt prezentis hamburgan vesperon. Okazis ankaŭ tute improvizita skizo pri vojaĝo al la kongreso de Sofio, interrompita per montrado de diapozitivoj de tiu kaj de aliaj urboj. La ludantoj Dro Roose, Dro Boulogne kaj Sino Cheverry rakontis humorplene pri siaj travivaĵoj. Ni admiris ankaŭ la unuan esperantofilmon: « Angoroj ». Ĝi vekis kompreneble grandan interesiĝon. Ĝi daŭras unu horon kaj estas rakontaĵo laŭ la Hitchcockmodoj. La bildoj pri Parizo estas tre belaj. La komentario de Prof. Waringhien tre bona; la rakonto mem tre streĉa. Nur unu rimarko: la interparoladoj estas iom artefaritaj ĉar malrapidaj. Tion faris la geakoroj pro evidenta zorgo, ke ĉiuj bone komprenu. Ludo ankaŭ tre bona. Tiu filmo havu sukceson... kaj sekvon. Aliaj esperantigitaj filmoj estis ankaŭ montrataj. Kelkaj kuraĝuloj tute enordigis la Volleyballteronon, tiel ke oni ĉiutage povis ludi. Poste ni iris al la naĝbaseno. Do, vi vidas ke tie estas ĉio por kontentigi ĉiujn.

Dimanĉon 12an de Julio, post konversacio pri la esperanto-literaturo, estis bele aranĝita ekspozicio. S-ro Roose donis multajn detalojn pri kelkaj verkoj. Sufiĉe multaj poste aĉetis unu aŭ plurajn verkojn. La 14an, oni grupe ĉeestis la nacian feston en Baugé.


La ferio daŭris 17 tagojn, kaj tamen estis multe tro malmulte. La disiro estis plena de nostalgio. Ni revenos, kiel ni kantis en la aŭdia kanto. Ni devas danki multajn, sed ĉefe gesinjorojn Cheverry, kaj Roux. Vivu Grésillon.

— Unu kiu ĉeestis. —

APUD GRESILLON

LE LUDE

Inter la gloraj kasteloj de Loire-valo (la tiel nomita lulilo aŭ ĝardeno de Francujo) Le Lude longdaŭre restis nekonata de multaj ĉar lokita tro nord-okcidente de la fama reĝa vojo.



Fakte, en la pasinteco, la nobel-civito Le Lude estis kvazaŭ pordo inter la tri provincoj : Anjou, Touraine, Maine kaj nun ĝi restas sufiĉe proksime de Grésillon — en centro de angulo inter la ĉef-urboj : Angers, Tours, Le Mans.

Longe, dum mezepoko, militistoj batalis ĉie-tie, ankoraŭ dum la longa Centjara Milito, kaj regis en Francujo granda mizero. Loré, Beaumanoir, Gille de Retz reprenis la nobeldomon de la angloj. La franca reĝo Ludoviko la dekunua ankoraŭ konservis la fortikaĵon, sed, kvindek jarojn poste, sub regado de Francisko la unua, ekaperis tri ĉef-verkoj de la franca arto : Chambord, Valençay, Le Lude. Tiu-ĉi lasta, impona konstruaĵo sufiĉe

masiva pro siaj dikaj turoj ĉe la anguloj estas do pura kreado de la franca Renesanco, sed al la antaŭa gotiko stilo, la postaj jarcentoj aldonis novajn fasadojn, tiel verkante historion el ŝtonoj. Kaj la vasta parko, la florigardenoj, la teraso super la rivero Loir (ne la Loire !) formas al ili majestatan kadron. Ĉu rigida kadro ? Tute ne. Precipe de kiam antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis por la kastelo la pompaj noktoj, kiuj revivigas por pli kaj pli mult-nombra publiko la riĉajn horojn de la pasinteco.

Se vi ŝatas belajn sonojn, poezion miksitajn al moderna scienco, se interesas vin la evoluon de la kostumoj, de la hararanĝoj kaj kap-vestoj, de la muziko, la danco, la arkitekturo, venu kun ni en le Lude. Sur tia natura, ampleksa scenejo, kun subĉielaj dekoroj, tekstoj, sonoj, lumoj, brila prezentado perfekte harmoniigitaj naskos vian mirigadon.

Jen teknika aspekto de tiu spektaklo : por la magio de la lumoj kaj de la akvo, tri cent projektiloj, cent reflektiloj, ses cent lampoj regitaj de tri lud-orgenoj ebligas multoblajn kombinaĵojn, ombrojn, lumajn nuancojn, surprizojn. Tiamaniere lumigataj dudek ses ŝprucofontanoj transformas la ĝardenojn, dum la rivero respegulas la kastelon kaj la sinsekvajn kolorajn movplenajn scenojn. Por tiuj eksterordinaraj teatraĵoj, multnombraj ĉevaloj, kolomboj, hundoj, ŝipoj, kaleŝoj, plej diversaj akcerozoj elsprucantaj el la jarcentoj, sed antaŭ ĉio, du cent

amatoraj artistoj, ĉiuj urbanoj de la urbeto, revivigas por ni la pompojn de la pasinteco.

Jen la festo donacita al sia edzino de Johano de Daillon, nobelsinjoro de Le Lude, por celebri la naskiĝon de ilia filo. Je la sonorigadoj de la hobojoj kaj tamburoj la festo komenciĝas. Vidu belulojn kaj belulinojn el la Renesanco sin pretigi por danci gracion pavanon. Poste, Henriko la kvara, ankaŭ nomita la « bona reĝo Henriko », en Le Lude haltanta, survoje de La Flèche al Chartres, por ĉeesti la konsekradon. Kaj, dum la regado de Ludoviko la dekkvara, la Markizino de Sévigné, kiu de akvokaleŝo elŝipiĝas ĉe Loir-bordo, en la parko de Le Lude. Ve! Ĝi ne trovas la bonan amikon, novan nobelsinjoron de Daillon. Ŝi skribas amleteron kiun ni aŭdos... sed ne trovos en la famkonata leter-kolektaro de la franca verkistino.

Kun nova posedanto de la kastelo, riĉegulo el Cinio revenanta, kaj ĝus nobeligita de Ludoviko la dekkvina, jen nova festo por celebri la freŝdatan akiradon. Movigaĵo por vi gedancistoj vestitaj de la tiamaj kostumoj, kiuj dancos por vi la Menueton de Mozart.

La scenoj ŝanĝiĝas. Jen la Revolucio, kiu tamen ne dispartigis la vilaĝanojn kaj urbanojn de ilia kastelano Frederiko de Talhouet partoprenas ĉiujn batalojn de la Na-

poleona Epoko, tie-ci prezentitaj per flagoj. Oni vidas tiun generalon rajd-alvenanta kaj revuanta la sinsekvajn regimentojn detale vestitaj, kiuj defilas je la sono de la tamburadoj.

Gloro... dekadenco. Kaj jen nova Imperiestro, Napoleono la tria. Ne estas li kiun ni vidas, sed lian ambasadoron kun la edzino, la bela princino Troubetskoi, dukino de Morny. Ili alvenas en granda defilo da elegantaj kaleŝoj tirataj de belaj ĉevaloj. Por ili gedancistoj donas agrablan spektaklon sub la arboj. Rigardu la valsojn, admiru la robojn.


Lastaj festoj de la « bela epoko », ĉaskurado, kornosonoj, ĉevaloj, hundoj, cervo. La kastelo mallumiĝas kaj forirante la aktoroj adiaŭas per la manoj. Ĝi revido! ŝajne ili diras.

Fakte, novaj tempoj venis. Nun la Loire-kasteloj estas historiaj monumentoj, veraj muzeoj, malfermitaj al ĉiuj, eĉ kiam, kiel Le Lude, ili ne estas ŝtat-propraĵo.

Multaj el ili brilas tage, kaj nokte, dank'al spektaklo de sonoj kaj lumoj, sed neniu pli, ĝis nun, ol tiu de Le Lude.

Spektintino.

(Kliŝoj A. Bachino, Le Lude).



ANEKDOTOJ PRI OTTO HERMAN

Tiu fama hungara scienculo, kies cent-dekkvinan nashiĝtagon oni nun rememoris en Hungarlando, okupiĝis pri plej diversaj branĉoj de la scienco. Lia stranga eksteraĵo, longa ruĝa hararo, granda ruĝa barbo ŝajnigis lin ofte vaganta vagabondo. Kiam li vizitis por esplori la religiajn pilgrimejojn por lukti kontraŭ la superstiĉoj, oni opiniis, ke li estas almozulo. Pro liaj atakaj artikoloj oni volis lin eksigi el sia modesta posteno. Pro tio li eĉ perdis sian membrecon en la parlamento, kiu donis vivsubtenon por la malriĉa scienculo. Kiam unu el liaj amikoj petis la tiutempan ministroprezidanton, ke oni helpu al li, tiu respondis : « Ja kion vi pensas, li pereu nur pro malsato ! »

Otto Herman ne bone aŭdis kaj poste eĉ tute surdiĝis. Pro tio li neniun fidis, sed samtempe li fariĝis eĉ atakanto Li kontraŭis ĉiun por defendi siajn konvinkojn, principojn, opiniojn. Pro tio li ofte — laŭ tiutempa kutimo — eĉ duelis. Foje okazis, ke lia kontraŭulo estis miopa. Kiam oni ekstaris por dueli, la miopulo demandis : « Kien mi celu ? Kie staras la surdulo ? » kaj Herman samtempe demandis : « Ĉu jam pafis la blindulo ? ».

Dum lia tuta vivo amike rilatis al li Ludoviko Kossuth kaj ties edzino. Kolomano Mikszath, la fama verkisto, nomis lin en siaj parlamentaj raportoj : « La drako de la parlamento, kiu vomas fajron kaj ĉiam matenmanĝas iun. »

Tiutempa ĵurnalartikolo tiel karakterizis lin :

« Kiam tiu vere grandkaraktera homo parolas kaj mi rigardas liajn harojn, mi pensas, ke li estas fortepian-virtuozo ; se mi rigardas lian vizaĝon, mi povas pensi, ke li estas iu germana profesoro : se mi ekvidas liajn mangestadojn, mi juras, ke li estas orkestro-dirigento ; kiam mi aŭdas lian voĉon, mia penso estas, ke li estas iu provinca eminentulo, kiu diras toston ; kaj se min plezurigas lia moviĝado, mi ekkrias : jen li ja estas dancinstruisto. Kaj fine, se mi legas iun el liaj natursciencaj verkoj, mi ekĝemas : Kion da damaĝo faras la politiko al la scienco ! »

Li mem tiel konfesis amare al sia amiko : « Ne iru en la parlamenton, tie oni povas nur perdi sian animon, ĝi kreis el mi ankaŭ nur mokantan senkredulon ! »

Samtempulo, Andor Kozma, kiu regule skribis politikajn kaj aktualajn verskronikojn en ĵurnalo, skribis pri Otto Herman en sia kroniko, ke li estis ribelanto kontraŭ la tuta mondo kaj estus devinta naskiĝi en iu venonta granda jarcento.

Ni vivas nun en tiu jarcento !

Kompilis Paŭlo Balkanyi.

La blanka vino en Anjou



Eble ne tiel konata eksterlande, kiel aliaj famaj francaj vinoj — Champagne, Bordeaux aŭ Bourgogne — la vino el Anjou tamen okupas honorindan lokon en la franca ekonomio kaj povas, ie ajn en la mondo, regali la plej frandemajn palatojn.

Kulturita en Anjou jam en la 4-a jarcento, la vitejoj, tuj de la 10-a jarcento enkondukis gravan enlandan komercadon pri vino, dank'al la tiam facila navigado sur la riverego Loire. En la 11-a kaj 12-a jarcentoj, dum la reĝado de la Plantagenets, la impona dinastio kiu samtempe regis super Anglujo kaj parto de Francujo, la blanka vino el Anjou grandskale iris al Anglujo.

Nun, la vitejoj kovras 32.000 hektarojn, duono el kiuj donas noblajn vinojn. Precipe la ecoj de la terenoj kondiĉis la lokigon de la vitejaro, kaj la vinoriginoj estas tiel diversaj kiel la geologiaj karakteroj de la grundo. Tamen, kvankam Anjou situas, en okcidenta Francujo, ĉe norda limo de la vinber-kulturado, ankaŭ la klimato, sufiĉe milda en la valo de Loire, influas. Eĉ la pluvoj, pli oftaj ol abundaj tie, donas al la aero malsekecon tre favoran por bona fruktigado de la vinberoj.

Ĉiuj noblaj vinoj, t.e. tiuj kiuj rajtas ricevi « kontrolitan nomon », estas rikoltitaj sur la sud-okcidentaj deklivoj de malaltaj montetoj. La rikoltado de la vinberoj okazas en oktobro kaj komence de novembro, kaj konsistas el tri sinsekvaj rikoltoj, laŭ la maturiĝo. Kiam la vetero estas favora, la blan-

kaj vinberoj iĝas blondaj, poste violkoloraj, fine brunaj kaj faltoplennaj, kiel sekigitaj beroj. Kompreneble, tia plumaturiĝo malgrandigas la produktadon, sed permesas eltiri mostojn 15, 16 gradajn, kaj eĉ ofte pli. Tre malrapida fermentado efektiviĝas en 220-litraj bareloj nepre malnovaj.

La produktantoj de Anjou-vinoj, plej ofte modestaj bienuloj, alportas al la kulturado, la rikoltado, ĉiujn necesajn zorgojn, kun spertoj plej ofte transdonitaj de patro al filoj. Tiamaniere la kvalito de la tieaj vinoj estas certa, kiaj ajn ili estas : blankaj, rozkoloraj, ruĝaj La plej famaj estas : la « Côteau de la Loire », nemulte dolĉaj blankaj vinoj por trinki prefere ĉe la komenco de marto ; la « Côteaux de Saumur » blankaj, rozkoloraj aŭ ruĝaj, malpezaj en la stomakoj, kun bona gusto eltirita el la tiea kalka grundo ; la « Côteaux de l'Aubance » — laŭ la nomo de rivereto, kiu serpentumas ĉe la piedo de montetoj — rozkoloraj kaj duondolĉaj ; la « Côteaux du Layon » — ankaŭ laŭ la nomo de rivereto — blankaj, dolĉaj kaj riĉaj. La plej bonaj el ili estas : « Quart de Chaume », « Beaulieu », « Bonnezeaux », k.a. En la regiono de Saumur, kies kalka grundo produktas vinon nature ŝaŭman, oni speciale preparas, en grot-kejoj tiun vinon por fortigi tiun emon al ŝaumado, kaj tiamaniere fari la tiel nomitan « Mousseux de Saumur », kies kvalito estas komparebla al tiu de ĉampano.

B. CHEVERRY.

ANTAŬ 150 JAROJ NASKIĜIS · EN MOSKVO

Mihail LERMONTOV

LA GRANDA RUSA POETO

Lia kuraĝa, ribelema, emociplena liro alvokas al batalo por la libero kaj la feliĉo de la homoj. Antaŭulo de Tolstoj li estis vera internaciisto. La Homo ĉiam defendanta siajn rajtojn, jen la ideo de la tuta Lermontova kreado. La nelonga vivo de la poeto (1814-1841) estis granda heroaĵo.

KIE LERMONTOV DUELIS (Pjatigorsk)

Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj runde — nur montar' kaj
[vento.
Min ĉirkaŭprenas emocij
de multsignifa korsilento...

Pardonu min, poet' amata, —
piedtuŝetis mi la teron,
sur kiu la duelo fata
mortpafis vin kaj liberon !

Ĉi tie pensas mi malĝoje
pri via sune-brila gloro,
kaj ruse kisas mi — trifoje —
la teron kun helruĝa floro...

Murdisto kuris for, tremanta
sub tondrobruio fulmobata.
Silente kuŝis ribelanta
poet', per pluvo priplorata...

Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj runde — nur montar' kaj
[vento.

Kaŭkazo brilas en radioj
de suna or' kaj neĝargento.

Mi same revas, kiel pluraj,
retrovi lokon inter montoj,
de kie fluas ĉarme puraj
de l'via poeziofontoj.

Vi — protestanto liberama,
vi — gentopatro de la tristo,
por ver' eterna torĉo flama,
flagranta fajro de l'rezisto.

Atingis vi la alp-altecon
kaj kun la suno en glacio
vi vekis florojn kaj belecon
de nia perla poezio !



Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj runde — nur montar' kaj
[vento.

Ĉe la sunondaj varmradioj
gigantas gloro dum jarcento.

Aleksandr Logvin.

Kelkaj poemoj de Lermontov

tradukitaj
de Aleksandr Logvin

SENTECO

Se povu scii la tutmondo'
ke vivo kun esper' amata
nur simple estas la kajer'
kun poemar' longkonata.
(1830)

VELO

Blanketas sola vel' ĉe rando
de marnebulaj blukolor'
Ĝi kion lasis ĉe hejmlando ?
Ĝi kion serĉas en ĉi for' ?
Petolas ondoj — vento blovas,
kaj klinas maston kun rigor'...
Ho ve, feliĉon ĝi ne trovas
kaj ne forkuras de favor' !
Sub velo — fluo hellazura,
de supre — sunradia or'...
Sed ŝtormo — ĝia peto nura,
kvazaŭ en ŝtorm' — kvietaj hor' !
(1832)

Iras mi al vojo unu, sola ;
tra nebulo brilas fora cel' ;
noktomez'. Dezert' atentas dion,
en silent' parolas stel' kun stel'.
En ĉiel' — solene kaj mirinde'.
En bluaĵ' de lumo dormas ter'...
Kial do turtrentas min doloro ?
Plendas mi ? ĉu veas pri esper' ?
Plu nenion mi de i' viv' atendas,
pri l'estinto — jam nenia plend'.
Serĉas mi liberon kaj kvieton !
Volus mi ekdormi en silent' !
Tamen ne en frida tomba dor-
[mo...

Mi dezirus tiel dormi nun,
por en brusto tremu vivofortoj
kaj eterne spiru sub la sun' ;
por en tago-nokto min dorlotu
amoplenta kanto en ripet',
por mallume, ĉiam verda kverko
super mi kliniĝu kun bruet'.
(1841).

FANTAZIAĴOJ (Senditaj de Hélène Chavan)...

Falinta naztuko

Rolas : junulino, junulo, anoncisto.

Lokoj : parkoj en 5 sinsekve diversaj urboj de la mondo.

en **Parizo**. — Li sidas sur benko. Malrapide preterpasas knabino, kiu serĉe fosas en sia mansako, el kiu falas naztuko. Li tuj levprenas ĝin, kaj genuante antaŭ ŝi, diras :

— Hohe ! bela brunulino, jen via punto kaj mia koro.

en **Novjorko** (sama sceneto). — Li tre lerte kaj ĝojege :
— Hello ! Baby. Jen, sed kisu min !

en **Moskvo** (sama sceneto). — Li : Pst ! Pst !... Kamara-dino...
Li trankvile seriozmiene ŝire duonigas la naztukon, enpoŝigas unu parton, donas la alian al ŝi kaj foriras sen rideto.

en **Glasgovo** (sama sceneto). — Li atendas la foriron de la knabino, levprenas la naztukon, atente, detale ĝin pririgardas :

— Bela materialo ! Pura kotono ; ĝi valoras almenaŭ du ŝilingojn !

en **Svislando** (sama sceneto). — Li forte, akre fajfas kiel policisto. La knabino timeme rigardas returnen. Li severmiene, kun etendita brako montras la naztukon surstrate kaj la paperkorbon. Ŝi honteme levprenas la naztukon kaj obeeme jetas ĝin en la korbon.

Gramatika angulo

Kiam Akro, patro de ĉiuj akridoj, lecionis al sia popolo de sur alta tigeto de genisto, li ofte ripetis :

« Memoru, ke duoblaj konsonantoj ne ekzistas en la ortografio de nia lingvo. Tamen, ne forgesu, ke tio povas okazi en kunmetita vorto, se oni elizias la finaĵon de la unua elemento. Ekzemple : rabbesto, huffero, raddento, paperrismo, okullevo, ktp... ».

« Ni scias, ni scias ! » sibilis Ŝaltarela, kiu abomenis gramatikon.

« Sed tion vi ankoraŭ ne scias, ĉar tamen ekzistas kelkaj tre malmultaj vortoj kun duoblaj literoj : nur por eviti konfuzon. Ekzemple : Finnlando, Gallo, aloo, maa-to »...

Malapropa murmuro trakuris la sekajn herbojn.

« Tiaj sciigoj estas nur por la UEA ekzameno ! ».

Kaj Stridula turnis al la patriarko :

« Prefere rakontu al ni, kion oni preparos por la Antaŭ ol Akro povis paroli, demandoj sagis de ĉiuj decembra festo en Grésillon ? ».

flankoj...

« Ĉu oni antaŭvidos meznoktan bankedon ?

ĉu oni ludos teatraĵojn ?

ĉu oni kantas kun akompano de gitaro ?

ĉu finfine oni povos danci ? ».

Fine Akro sukcesis ĉiujn silentigi, kaj deklaris :

« Ĉion vi legos en nia bela revuo « Kulturaj Kajer-
roj », kiu ĵus aperis ».

« Haaaaaaa !!! » ĝojis la tuta amaso, kaj ili rapide diskuris ĉiu al sia leterkesto por vidi, ĉu la poŝtisto alportis la lastan numeron de la ŝatata revuo.

Noto de la redakcio. — Jes, karaj akridoj, vi povos danci, okaze de la decembra festo. Kaj antaŭe vi povos vidi belan filmon, kanti, kaj ĝui agrablan meznoktan bankedon !



La ĉokolad-kremo tiom plaĉas al la infanoj,
kiom KULTURAJ KAJEROJ al la gepatroj.

Abonu. Abonigu viajn amikojn

Adreso sur la unua kovrilpaĝo.

Listo de la perantoj sur la lasta.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Legu la regularon sur la antaŭa numero de la revuo kaj sendu viajn respondoj antaŭ la fino de Januaro 1965 al :

S-ro P. Chevalier, 19 bd. G.-Lauriol, Nantes (L.-A.)

La novaj abonintoj rajtas sendi samtempe la solvojn de la du antaŭaj problemoj.

UNUA PROBLEMO (16 poentoj)

Ĉi sube vi trovos 4 grupoj de 4 vortoj. Estas proponitaj signifoj. Vi devas elekti por ĉiu vorto la taŭgan signifon.

- | | |
|------------|---------------------------------------|
| a) Kambio | 1) Infanoj ŝatas ĝin |
| b) Kambrio | 2) Oni devas gardi ĝin en la kapo |
| c) Kando | 3) Pratempa |
| d) Kandelo | 4) Paperaĵo ofte traskrekita |
| a) Mantiso | 1) Insekto kruela |
| b) Mantilo | 2) Nur matematikistoj uzas ĝin |
| c) Mantelo | 3) Uzita de virinoj el suda Eŭropo |
| d) Manto | 4) Kelkfoje sen..., kelkfoje kun... |
| a) Puso | 1) Malofta en dezerto |
| b) Puŝo | 2) Troviĝas en absceso... kaj aliloke |

c) Puto

d) Putoro

a) Radio

b) Rado

c) Radiko

d) Radiumo

3) Malgranda besto, kies felo estas ŝatata de sinjorinoj.

4) Plej ofte malamika, sed povas esti utila, kiam bone direktita.

1) Kelkfoje oni povas esti la kvina

2) Plej ofte troviĝas sub la tero.

3) Povas veni de la suno

4) Malofta kaj multekosta metalo.

DUA PROBLEMO

Bonvolu korekti la erarojn en la ĉisubaj frazoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita sed atentu ! Estos forprenita po 1 poento por ĉiu eraro aldonita ĉar kelkaj frazoj estas eble tute korektaj.

- Anstataŭ kafon li donis al mi teon kun sukeron sed sen kremon.
- Li promenas sur la strato.
- Tra la fenestro la vaporo iras sur la korto.
- Mi dankis lin por la plenumado de mia deziro.
- Du ekbriloj de fulmo trakuris trans la malluma ĉielo.

Al ĉiuj mi deziras bonan sukceson, ĝojigan jarfinfestojn, kaj feliĉan novjaron.

AMUZAJ PROBLEMOJ (ekster la konkurso) Solvaj de la lastaj problemoj :

Sak-engmo. — Jen la trovota frazo.

« Mi faras al vi donacon, ke, ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono ».


La ĉiferoj indikas la ĉevalmovon.

35	6	27	12	9	
NO	DO	FLO	VOR	KE	
26	13	8	17	28	11
AŬ	TO	CON	DI	RO	ĈIU
7	34	5	10	1	30
NA	ŜTO	VI	ĈE	MI	MUL
14	25	16	29	18	21
KI	OS	VI	AŬ	ROS	BU
33	4	23	20	31	2
TA	AL	EL	VIA	TE	FA
24	15	32	3	22	19
IR	UN	KOS	RAS	ŜO	EL

NOVAJ PROBLEMOJ (S-ro Jarlier)

Magia kvadrato : Loku ĉiun el la naŭ unuaj nombroj en unu el la naŭ fakoj de la kvadrato tiamaniere ke la sumo de la tri nombroj enskribitaj en ĉiu horizontala, vertikala kaj diagonala linio estu 15.

Paradokso : Demontru $2 = 3$.




GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Post pasivaj participoj la prepozicio « de » ĉiam montras nur la **aganton** ; ekzemple, en la frazo « la libro estas legata de Adolfo » la prepozicio « de » montras, ke Adolfo estas la aganto, kiu legas. Uzi post pasiva participo simplan prepozicion « de » en ia alia senco ni devas ĉiam eviti. »


L.L. Zamenhof. Lingvaj respondoj.



— Kiom feliĉa vi estas, Sinjorino Stel, esti akompanata de tiom galanta edzo.



— Oni ĉiam estas helpata de la plej simplaj rimedoj.



— Li ĉiam estis favorita de la sorto.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Ceĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronci, Bana Cigel, PRIEVIDZA.

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Via Po, 7, TORINO.

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandaĵn esperantistojn kaj eventuale iam aĵn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
 Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
 Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
 Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
 Por studi specialajn problemojn ;
 Por inter amikoj gaje libertempi ;
 Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo